LETEROJ DE EUGÈNE ADAM AŬ LANTI AL EDMOND PRIVAT

KUN KOMENTARIOJ DE PIERRE HIRSCH

Studoj

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

3

LETEROJ DE EŬGENO ADAM (LANTI) AL EDMOND PRIVAT

Pro la 28-a Kongreso de SAT-Amikaro okazinta dum aprilo 1973 en Lausanne, ŝajnis al ni interese publikigi tiuokaze la leterojn de Eùgeno Adam konservatajn en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Tiuj leteroj, ĉiuj adresitaj al Edmond Privat (escepte unu al lia edzino dum li estis grave malsana), estas partoj de diversaj donacoj; fakte kelkaj dokumentoj rilataj al Esperanto estis donacitaj al esperantistoj antaù la konvencio de la 10-a de junio 1964, kiu estas la donaca akto pri la arkivoj de Edmond Privat al la Urbo de La Chaux-de-Fonds.

La ok leteroj de Eùgeno Adam estas kunigitaj dank' al la kunlaboro de s-ro Claude Gacond, arkivisto de la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo (CDELI), kaj de f-ino Margaret Huber, kanada studentino, kiu preparas tezon pri Esperanto kaj Ligo de Nacioj.

Bedaùrinde, ni ne havas la leterojn adresitajn de Edmond Privat al Eùgeno Adam. Ni esperu, ke tiujn oni konservis en la arkivoj de Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj ke oni povos iam ilin retrovi. Aliflanke, ni posedas nur kelkajn izolajn numerojn de LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE; ankaù tiurilate, ni esperas, ke niaj kolektoj povos kompletiĝi.

La leteroj, kiujn ni publikigas, datiĝas ĉiuj de la jaro 1920. Ja ŝajnas, ke pli fruaj ekzistas; eble ekzistas ankaù postaj, sed tio ŝajnas malpli probabla.

Ni devas koncize prezenti la aùtoron kaj la ricevinton de tiu korespondado.

Eùgeno Adam (kiu poste alprenis la pseùdonomon Lanti, tio estas L'Anti, la kontraùulo) naskiĝis en 1879 en Normandio, de kamparanaj gepatroj. Li lernis la metion de lignaĵisto, sekvis vesperajn kursojn en liceo kaj iĝis instruisto de praktiko en métia lernejo. Ĝis 1914, li estis anarkiisto: "... Vi scias, ke ĝis 1914, mi estis anarkiisto k tute sub la influo de Reklu, Kropotkin, Gráv k. a. teoriuloj anarkiistaj." (Leteroj de E. Lanti, p. 179). Kontraùmilitaristo, li partoprenis la militon kiel flegisto, kaj iĝis malamika al ŝovinismo kaj naciismo. Li lernis Esperanton komence de la Unua Mondmilito, kaj baldaù vidis en la internacia lingvo ilon por kontraùbatali la difektojn de l' naciismo. En 1919, li revivigis LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE, kaj en decembro 1920, post la fama kongreso en Tours, iĝis ano de la Komunista Partio ĝis 1929. "Kvankam mi neniam estis tre ortodoksa komunisto, tamen mi apartenis al la franca kompartio ekde ĝia fondiĝo ĝis 1929. Tiam mi havis la esperon, ke Komintern povus forte antaùenpuŝi la esperantan aferón. Estis naiva iluzio..." (Leteroj de Lanti, p. 170). Ŝajnas ja, ke Eùgeno Adam jam proksimis al revoluciaj sindikatistoj, kiaj Pierre Monatte kaj Alfred Rosmer, kiuj ankaù forlasis la Francan Komunistan Partion. La esenca problemo ŝajnis esti, por Adam, lukto kontraù la milito; tio lin proksimigis, interalie, al Romain Rolland kaj Henri Barbusse. Lin profunde penetris sento pri la ĝusto de la internaciaj (aù eĉ sennaciecaj) ideoj de Zamenhof kaj Hector Hodler

Edmond Privat naskiĝis en Ĝenevo en 1889, en familio de protestantaj edukistoj. Ankoraù juna liceano, li fondis je la aĝo de 14 jaroj esperantan gazeton JUNA ESPERANTISTO, kiun li eldonis kun sia amiko kaj samlernejano Hector

Hodler. Organizinte la 2-an Universalan Kongreson de Esperanto en Ĝenevo (1906), li estis rimarkita de Zamenhof, kiu lin kuraĝigis entrepreni propagandan vojaĝon al Nordameriko. Akirinte ĉe Sorbono licencion pri beletro, li kunlaboris, dum la milito 1914-18, al diversaj parizaj ĵurnaloj, precipe LE TEMPS kaj L'HUMANITE. Ĉi lasta gazeto tiam estis la organo de la Socialista Partio; Edmond Privat skribis por ĝi sub la pseŭdonomo P. Dorange. Lia kampanjo favore al la sendependiĝo de Pollando lin devigis reveni al Svislando, kie li batalis por la paco kaj la internacia interkompreno per Esperanto. Ekde 1919, li iĝis kronikisto pri eksterlanda politiko ĉe DROIT DU PEUPLE, socialista ĵurnalo de la kantono Vaud, kaj ĉe diversaj aliaj gazetoj precipe socialistaj aŭ kooperativaj. La 15-an de aprilo 1920, li aliĝis al la ĝeneva socialista partio. Edmond Privat dum la junaĝo estis forte impresita de la arda konvinkiĝo de la anarkiisto Luigi Bertoni, sed, vere ligita al la demokratio, li neniam havis simpation al la bolŝevismo.

Kio ligis Adam kaj Privat, tio estis la konvinkiĝo, ke Esperanto helpus venki kaj eĉ detrui la ŝovinismajn antaŭjuĝojn kaj kontribuus starigi veran pacon.

LETERO 1

Enkonduko

La komenco de tiu ĉi letero bone montras, ke la rilatoj Adam-Privat jam ekzistis antaŭ januaro 1920. Ŝajnas al mi, ke ili povus laŭdate koincidi kun la "reviviĝo" de LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE = ESPERANTISTA LABORISTO (la gazeto estis dulin-



gva) en aùgusto 1919. Efektive, en la n-ro 228/229 (aùgusto-septembro 1919) de ESPERANTO, la oficiala revuo de Universala Esperanto-Asocio, redaktita, por la esenca parto, de Hector Hodler kaj Edmond Privat, oni anoncas la aperon de la unua numero de la nova serio de LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE:

"La nova gazeto respondas veran bezonon kaj certe multe helpos al'la disvastigo de Esp. ĉe Francaj laboristoj." La letero, kiun Romain Rolland skribis al Eùgeno Adam kaj kiun tiu publikigis en tiu unua numero de LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE estas komplete reproduktita en ESPERANTO. Estas certe, ke Edmond Privat kaj Hector Hodler havis, pri la rimedoj starigi la pacon, ideojn sufiĉe proksimajn al tiuj de Eùgeno Adam. Ni scias, ke Hector Hodler skribis al Adam en 1919; estas tre verŝajne, ke ankaù Edmond Privat tion faris. Fine, por ne preterlasi kredeblan hipotezon, estas konjekteble, ke Edmond Privat kaj Eùgeno Adam renkontiĝis en Parizo en 1915, dum la periodo kiam Privat vizitis rondojn de pacistaj laboristoj, sindikatistoj revoluciaj kaj anarkiemaj, kiaj Pierre Monatte kaj Alfred Rosmer.

Teksto

E. Adam
24, Boulevard Beaumarchais
Paris (XIe) 12.1.20

Kara Samideano,

Viaj leteroj estas por mi ĉiam kuraĝigoj. Mi do dankas al vi.- Estas superflue, ĉu ne? gratuli vin pro via propaganda sukceso. Estas tute bedaùrinde ke en Paris ne estas fervoraj

kaj talentaj propagandistoj.- Tie-ĉi en Parizo, en niaj antaŭemaj medioj, ne estas eble ignori la Idistojn. Ili okazigas kontraŭdirajn kunvenojn kaj se la Esp. ne venas kontraŭdiri il(i) klaĉadas ĉie kaj laŭte: "Ha! kompreneble, la Esp. ne venis defendi Esp.on: ĉar ĝi ne estas defendebla." Tial ke nur en soc.-junularaj kaj similaj grupoj oni vere iom interesiĝas pri L.I. estas tute necese kontraŭdiri la Idistojn. Jam, plurfoje, tion mi faris; sed mi ne povas ĉion fari!..- Mi sendis al vi "La Vague" (1) en kiu vi legos idaĵojn. Kiel vi povos konstati ĉiuj konas Idon en niaj soc.-medioj.- Jen kia estas mia starigo en kontraŭdira parolado: Ni esp. ne konsideras Esp.on kiel tute perfekta. Ĝi estas tamen almenaŭ tiel perfekta kiel Ido, kaj ĝi havas la grandan superecon esti jam disvastiĝata en la tuta mondo. Tuj ĝi povas utili al ties uzantoj. Nia lingvo evoluos, pliboniĝos aŭ pliriĉiĝos per la uzado same kiel la naturaj lingvoj. Tial ke la definitiva solvo povas nur okazi de fakta autoritato, ni restas provizore fidelaj al nia Fundamento. Dum la Idistoj por konservi unuecon de ilia lingvo povas nur kalkuli sur neebla perfekteco. Iuj esp.oj volus ke oni prezentu Esp.on kiel ion tute perfekta. Mi konsideras ke tiamaniere ni maltrafas la celon. Cetere, kiel Sro H. Hodler skribis al mi: "Ĝis nun la Esp.oj estis tro konservemaj." Mi samopinias.- Sro Meillet diras: "je suis convaincu que, (2) avant d'être définitivement adopté, le Fundamento devra être revisé... En matière de langue la décision ne dépend pas de grammairiens... Le problème ne prendra un aspect réel que le jour où les gouvernements, ou à défaut un ensemble d'organisations int. (des syndicats (3) par ex.) décideront d'utiliser une langue art. ..." Mi trovas utile ekspluati eĉ tiun diron. Domaĝe mi devas fini.- Mi sendis mian gazeton al la



adresoj de vi donitaj. Kun tutkoraj salutoj

E. Adam

(Postskribaĵo:) Mi sendis al vi "Eso (la resto de la vorto estas nelegebla).

Notoj

(1) LA VAGUE havis kiel subtitolon "semajna gazeto por pacista kaj socialista batalo". Ĝia direktoro estis Pierre Brizon, socialista deputito. La unua numero de LA VAGUE aperis la 5-an de januaro 1918.

(2) Antoine Meillet (1866-1936), fama franca lingvisto, profesoro ĉe Collège de France. Li publikigis en 1918 "Les langues dans l'Europe nouvelle" (La lingvoj en nova Eŭropo), verko en kiu li sin deklaras favore al artefarita internacia lingvo. Simpatia al Esperanto ĝenerale, li tamen kritikis kelkajn strukturojn, precipe la uzon de akuzativo.

(3) En 1919, la kongreso de C.G.T. (Confédération générale du travail) adoptis en Lyon rezolucion favoran al Esperanto.

Esperantigo de la citaĵo el Meillet:

"Mi estas konvinkita, ke antaŭ ol esti definitive oficialigita, la Fundamento devos esti reviziitá... Lingvo la decido ne dependas de gramatikistoj... La problemo fariĝos reala nur kiam la registaroj, aŭ almenaŭ aro da int. organizaĵoj (sindikatoj ekzemple) decidos uzi artefaritan lingvon..."

LETERO 2

Teksto

LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE

socialiste - syndicaliste - libertaire - internationaliste

"Pour que les peuples s'entendent, il faut d'abord qu'ils entendent. Que l'Esperanto rende l'ouïe à ces sourds, dont chacun, depuis des siècles, est muré dans son langage!" (1) Romain Rolland

Proletarioj el ĉiuj landoj unuiĝu

Esperanto - Lingvo Internacia

E. Adam
24, Bd Beaumarchais
PARIS - XIe

Paris la 23an de Februaro 20

Kara Samideano.

Tial ke, malavare kaj kuraĝige vi interesiĝis pri nia ĵurnalo, mi sentas min en plena fido por iom senĝene babili kun vi.- Dankon pro via bonintenca konsilo pri dezirinda forlaso de teoria diskutado. Tia konsilo alvenas tre ĝustatempe kaj pruvas al mi ke malgraŭ foreco ni tute juĝas same pri propaganda vidpunkto. Ricevanto la Martan n-on de "E.L." (2) (mi liveras la prenotaĵon la 15-en de ĉiu monato) vi povas konstati ke ĝi ne enhavas teorian diskutadon.- Nun ni eniras novan fazon de propagando. Ni forbalais la idistan kampbatalon; ni okupis tre bonan pozicion de kie ni direktos nian antaŭenpuŝon por konverti la socialistaron. Sed mi konsideras ke tia antaŭfaro, kian ni faris,

estis nepre necesa. Kompreneble mi ne volas diri ke tia metodo estas rekomendinda en aliaj medioj. Ĉio devas rilati pri tempo kaj loko.- Vi trovos tamen en la esp. teksto recenzon tro longan de M. Elbo (Marcel Boubou (3) instruisto, tre fervora kaj malavara por nia ĵurnalo) pri la kreaĵo de Sro de Saussure (4). Mi ne povis rifuzi tiun recenzartikolon. Cetere oni povas samopinii kun la redaktoro de Esperanto-Praktiko, ke estas necese defendi la esperantistojn kontraŭ la allogoj de la reformemuloj. Do temas nur pri la graveco, kiun oni devas konsenti pri tio.- La tasko de ĵurnalmastrumanto ne estas ĉiam facila. Mi devas elekti inter diversaj pres(s)endaĵoj kaj okazas malkontentoj pro la neenpresitaj artikoloj. Neeble kontenti ĉiujn artikolsendintojn. Kaj ni devas precipe zorgi kaj klopodi pri la materia vivo de l' ĵurnalo!... La preskostoj estas ĉiam pli altaj. La baldaŭa plialtiĝo de la afrankoj estas timiga por mi. Ni tamen penos por trapasi tiun malfavoran pasaĵon. La penso ke Sro Archdecon (tiel en la letero: 5) havas 25.000 Fr en poŝo kaj donas al ni nenion iom kolerigas min. Ni povus tiom fari en niaj medioj se ni havus propagandilojn. Iafoje mi demandas min ĉu ne estus trafe min turni rekte al Sro Voisin (6), la donacanto? Perpleksa mi estas...

Mi finas mian babiladon vin gratulante pri via ĉiama fervoreco kaj fruktodona propagando. S-ro H. Hodler kaj vi estas la plej multvalora korno de la esperantistaro - vidpunkte de la fervoreco kaj sagaceco pri la orientiĝo de nia movado.

Tutkore al vi E. Adam

Mi sendas n-on de "Clarté"

P.S. Glodeau (7) ricevis vian mondon(a)con.

(Sur aldonita folio:) Ni havas nun 531 abonintojn.

Estas necese duobligi tiun nombron. Vi eble jam rimarkis ke la lasta n-o enhavis 5 paĝojn de esp. teksto. Sekve de la anonco, kiun mi aperigis en "Esperanto" mi celis al la eksterlandanoj. En la lasta n-o de "Esperanto" oni raportas favore al nia ĵurnalo, sed temas pri la Dec-Januara n-o. Mi esperas ke la recenzisto de tiu ŝatata organo atentigos denove sian legantaron pri via bonega artikolo abonemigante al nia ĵurnalo. Kiam ni havos 1000 ab. ĝia vivo estos preskaŭ antaŭ-certigata.

Samideane EA.

Notoj

(1) E. Adam presigis sur la leter-papero de LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE tiun frazon de Romain Rolland, ĉerpitan el la letero, kiun sendis al li la granda verkisto kaj kiun la gazeto publikigis en la unua numero.

(2) Esperanta Laboristo.

(3) Marcel Boubou, menciita en "Historio de SAT" p. 59.

(4) La ĝenevano René de Saussure estas bone konata inter adeptoj de internacia lingvo pro lia kreo de pluraj lingvaj sistemoj: Antido, Esperantido ktp.

(5) Ernest Archdeacon, naskiĝis en Parizo en 1863. Advokato, pioniro de aŭtomobilismo kaj aviado. Fondinto de "Automobile Club de France". Aprobanto kaj mecenato de Esperanto.

(6) Temas sendube pri Gabriel Voisin, naskita en 1880, fama konstruanto de aviadiloj kaj aŭtomobiloj. Li estis tre ligita al Archdeacon.

(7) Louis Glodeau, franco, naskita en 1891. Ludis tre gravan rolon en SAT ekde 1921.

(8) CLARTE, organo de la "Movado Clarté" fondita de Henri Barbusse kun la apogo de internacia komitato de intelektuloj. La unua numero de CLARTE aperis la 11-an de oktobro 1919 kun la subtitolo "Franca Bulteno de la Internacio de la Penso". La n-ro 5/6 de la 21-a de februaro 1920 (tiu sendita al Privat) enhavas artikolon de Eùgeno Adam titolitan "La langue universelle" (la universala lingvo). La propagando kaj la polemiko por internacia lingvo (Esperanto, Esperantido, Ido) daùras dum pluraj monatoj kun artikoloj de E. Chenevard, Henri Barbusse, R. Naigret kaj Charles Baudouin.

Esperantigo de la citaĵo el Romain Rolland:

"Por ke la popoloj sin reciproke aùdu, estas necese, ke unue ili aùdu. Esperanto rehavigu la aùdopovon al tiuj surduloj, kiuj depost jarcentoj estas enmurigitaj en sia lingvaĵo!"

LETERO 3

Teksto

Sama leterfronto, kiel por la letero n-ro 2.

Sama adreso.

15-4-20

Kara Samideano

Mi estis petinta artikolon al R. Rolland pri la morto de H. Hodler (1), kaj hodiaù mi ricevas de la fama verkisto tre gravan kaj interesan leteron el kiu mi eltiras la jenon:

"Non je n'ai pas connu personnellement H. Hodler (que j'admire). Je ne l'ai rencontré qu'une seule fois (2) et j'ai seulement correspondu une ou deux fois avec lui. Vous devriez demander un article à Edmond Privat, qui était en relations amicales avec lui. (son adresse est 27 avenue Secrétan, Lausanne). Je pense que vous connaissez Ed. Privat qui est un fervent espérantiste."

Mo do, senhezite, turnas min al vi. Cetere estas pli bone se vi mem verkas artikolon pri nia bedaùrata, granda, praktikanta internaciisto H. Hodler. Mi ne bezonos fari tradukon esperanten.

Vi sendube scias ke la fondinto de U.E.A. sendis al mi tre kuraĝigajn leterojn. Eble vi respondos ke jam vi estas verkinta artikolon por "Esperanto" (3). Sed mi opinias ke vi povos en nia ĵurnalo trakti pli libere la internaciecon de la spirito de via amiko H. Hodler.

Mi esperas ke regule vi ricevas nian gazeton. Malgraù la tute malfavoraj cirkonstancoj (en la teksto: circonstancoj), ni tamen sukcesas pliampleksigi nian organon. Pri ĝi mi tre deziras koni vian opinion kaj estus danka ricevi viajn ŝatatajn konsilojn.

Atendante vian respondon mi petas vin, ke vi bonvolu akcepti miajn samideanajn kaj sincerajn salutojn

Tutkore al vi

E. Adam

P.S. La presotaĵon mi devas liveri al la presisto ĉirkaù la 20a.

Mi citu ankoraù unu frazon de R. R.: "Mon espoir est qu'en ceci (la L.I.) comme dans tt. le reste, la République des Soviets décidera et que le socialisme d'Occident suivra. Le cerveau

du monde du Travail est maintenant à Moscou."

Notoj

(1) Hector Hodler, naskita en 1887, mortis en Leysin, la 31-an de marto 1920.

(2) Estas, ŝajne, Edmond Privat, kiu prezentis Hector Hodler al Romain Rolland, ĉe la Agentejo por Militkaptitoj de la Ruĝa Kruco, en Ĝenevo.

(3) La revuo ESPERANTO publikigis en la n-ro 236 (aprilo 1920) artikoleton de Privat titolitan "Morto de Hector Hodler" kaj en la n-ro 238 (junio 1920) alian titolitan "La verko de H. Hodler".

Esperantigo de la citaĵoj el Romain Rolland:

"Ne, mi ne persone konis H. Hodler (kiun mi admiras). Mi renkontis lin nur unu fojon kaj mi nur korespondis kun li unu aŭ du fojojn. Vi devus peti artikolon al Edmond Privat, kiu estis en amikaj rilatoj kun li. (Lia adreso estas 27 avenuo Secrétan, Lausanne). Mi pensas, ke vi konas Ed. Privat, kiu estas fervora esperantisto."

"Mia espero estas, ke en tio ĉi (la L. I.) kiel en ĉio alia, la Respubliko de la Sovetoj decidos kaj ke la socialismo de Okcidento sekvos. La cerbo de la mondo de la Laboro estas nun en Moskvo."

LETERO 4

Teksto

Sama leterfronto, kiel por la letero n-ro 2.

Sama adreso.

22-4-20

Kara Samideano,

Mi bruegas, laù via konsilo, kiel eble plej.

R. Rolland al kiu mi anoncis la novaĵon pri esp.o en Rusio respondas:

"Bravo pour la nouvelle! La décision que vient de prendre le gouvernement des Soviets pour l'enseignement obligatoire de l'Esp.o dans toutes (1) les écoles de Russie est un événement historique, dont les conséquences sont immenses; il aura plus fait pour l'Internationale humaine que toutes les discussions de théories ou les querelles de partis où s'absorbe le socialisme d'Occident."

R. R. aldonas: Vs pouvez publier si vs voulez.

Kompreneble mi publikigos tiun saĝan diron; sed eble viaflanke vi povos profiti pli bone ĉar vi havas gravan tribunon (2). Vi povus ankaù samtempe konigi nian ĵurnalon.

Decidu pri tio, kiel vi kredas ke estas pli bone por nia komuna afero.

Tutkore via E. Adam

Notoj

(1) La instruado de Esperanto komenciĝis en la lernejoj de Moskvo, Petrogrado, Tver, Orel kaj

Smolensk.

(2) Edmond Privat publikigis kaj komentis la novaĵon sub la titolo "Venkoj de Esperanto" en ESPERANTO, n-ro 237 (majo 1920). Aliflanke, li verkis pri tiu temo longan artikolon en LA VOIX DU TRAVAIL, de la 1-a de majo 1920.

Esperantigo de la citaĵoj el Romain Rolland:

"Gratuloj pro la novaĵo! La decido, kiun ĵus prenis la registaro de la Sovetoj por la deviga instruado de Esp.o en ĉiuj lernejoj de Rusio estas historia evento, kies konsekvencoj estas grandegaj; ĝi estos farinta por la homa Internacio pli ol ĉiuj diskutoj pri teorioj aŭ ĉiuj kvereloj de partioj, kie distriĝas la socialismo de Okcidento."

"Vi povas publikigi, se vi deziras."

LETERO 5

Teksto

Sen adreso

10-5-20 (Ĉe lernejo)

Kara Samideano,

La ĵurnalo "Le Populaire" (1) * per unu linio anoncis la gravan decidon pri kiu vi parolas en via ŝatata letero. Kiel vi, mi timas iom pro la ne longa tempo, kiun havos la delegitoj ĝis la Milano'a Kongreso. Oni tro ofte diris ke Esp.o estas facile, senpene lernebla. Por ĝin uzi praktike en kongreso oni bezonas pli ol tri monatojn da lernado, kiel estas kutime dirite.-

Ĉiulunde iuj soc. propagandistoj kutimas kuneveni tagmanĝi ĉe "Taverne Gruber" 5, B-d St. Denis. Fabre (2) regule venas. Hodiaŭ mi do tagmanĝis kun li kaj profitis la okazon por diri ke li devas diligente lernadi. Li promesis. Mi instigis lin por ke li organizu kurson kaj metis min je lia dispono. Li promesis zorgi pri tio.- Do, kiel vi vidas, mi iom komencis plenumi viajn afablajn "ordonojn". Vi ne devas peti pardonon por doni al mi tiajn konsilojn, kontraŭe vin mi dankas. Cetère, nur de vi kaj de via bedaŭrata amiko H. H. mi ricevis konsilojn kaj kuraĝigojn, kaj mi povas diri ke ili estis ĉiam bonfaraj.- Nu, permesu ke mi sciigu vin pri la stranga maniero kiel dungitaj oficistoj por la esp. propagando plenumas sian oficon: Lastatempe kamarado iris ĉe la "C.O." (3) kaj diris al la Sekretariino, Sino Ferter, aŭ Cense (4) (estas malfacile scii la veran nomon) kiom ni ĉiuj soc. esp. ĝojas pri la decido de la Soviet. reg.. Ŝi respondis: "Ho, tio ne estas serta; oni ne devus bruadi tian informon; cetere Sro Privat kutimas blufi. k.t.p." La naiva kamarado tute konsternita rakontis tion al ni ĉe la kunveno en la Labor-Borso.- Sed vi, vi daŭrigu blufi!..- Neniu pli bone ol vi povas anstataŭi H. Hodler ĉe la redaktado de "Esperanto" (5). Mi tre ĝojas pri tio kaj petas, ke vi akceptu mian plej koran, plej sinceran gratulon.- Nu, miaj lernantoj bruadas kaj mi devas fini; sed mi volis tuj respondi vian leteron. Baldaŭ estos la 16-a. Mi liberiĝos kaj iros klopodi por nia kom.a (verŝajne komuna) afero.

Tutkore kaj sindoneme al vi E. Adam

(P.S.:) Dankon kaj gratulon por la artikoloj senditaj. (Tiel en la teksto).

* L'Humanité (1) ne diris eĉ unu vorton.

Notoj

(1) LE POPULAIRE de Parizo estis iagrade la organo de la socialista minoritato (Blum-Longuet) oponanta la aliĝon al la Tria Internacio; L'HUMANITE iĝis post la skismiĝo de la kongreso en Tours (decembro 1920) la organo de la plimulto, tio estas de la Franca Komunista Partio.

(2) Plej probable temas pri la ĵurnalisto Henri Fabre, direktoro de JOURNAL DU PEUPLE kaj HOMMES DU JOUR, kiu iĝis redaktoro ĉe L'HUMANITE kaj estis eksigita en 1922. Lin koncernas gravaj partoj en "Mémoires" (Memuaroj) de Jules Humbert-Droz, volumo II.

(3) Centra Oficejo en Parizo.

(4) F-ino Cense estis dum pluraj jaroj administrantino de la Centra Oficejo. Ĉar ŝi estis intime ligita al Pollando, ŝi ne sentis multan simpation al Sovetio.

(5) Edmond Privat estis ĉefredaktoro de ESPERANTO de 1920 ĝis 1934.

LETERO 6

Teksto

Sama leterfronto, kiel por la letero n-ro 2.

Sama adreso.

4-7-20

Kara Samideano,

Mi kredas, ke estas utile komuniki al vi la jenajn pripensindaĵojn: 1-e En aparta folio de

"E.E." (1) (Julio 1920) estas artikolo de Dro F. Corret (2) pri "io" en kiu mi trovas sofisajn argumentojn. 2-e En la Aùgusta n-o de "E.L." mi publikigos leteron de H. Hodler en kiu estas inter alio, la jena frazo: "Mi ja scias, ke "io" estas malgravaĵo sed ĝia eksperimentebleco estas principa demando, de kies dependas ĉu Esp.o ŝtoniĝos aù evoluos.." 3-e En Francio estas nun prilaborita gramatiko en kiu troviĝas "io" (En Finlando jam ekzistas unu; kaj ankaù en via lerno-libro vi aludas tiun sufikson) 4-e Mi ĵus ricevis leteron de H. Barbusse el kiu mi citu la jenoñ: .."Il est en effet nécessaire que nous n'apparaissions pas désormais comme des traditionalistes bornés, sourds à tte espèce de suggestions. Il faut que nous attirions à nous les idistes par le bon sens; ć.à.d. en reconnaissant le bien fondé de q.q. apports idistes qui s'imposent vraiment; c'est ainsi que le fossé se comblera, je crois..." (3)

Nu, je la sama momento, mi ricevas komunikaĵon pri la nove elektitaj akademianoj, inter kiuj kun vera plezuro mi konstatas vian ĉeeston. Sed ŝajnas ke plejparte el niaj konduktoj estás "egaj konservativuloj" kiel skribis H. H. (4). Kaj, malgraù mi venas en tian spiriton ĉi-tiun penson, ke lastatempe vi skribis: "mi ne sentas eĉ iom da entuziasmo por "io"." Mi ne volas tamen supozi ke tiu frazo helpis al via elekto, aù pli ĝuste dirite ke ĝin vi skribis tiucelé. Pardonu al mi, tiel malkaŝe diri tiun ekpenson. Sed, mi kutimas ĉiam diri kion mi pensas eĉ al personoj ne simpatiaj al mi; tial al vi, kiu estis tiel afabla kaj helpema al mi, senhezite mi kvazaù pensas laùte ĉeeste al vi!..

Kara samideano, mi opinias, ke la propagando por Esp.o devas esti farata laù direktoj

ne similaj al tiuj sekvataj ĝis nun de iuj malnovaj esp.istoj. Mi kredas, ke la bedaùrata direktinto de U.E.A. estis en la bona vojo, kaj ke fidele ankaù vi ĝin sekvos, ĉar verŝajne via amikeco kun H. H. faris, ke vi ambaù difinis tiun vojon sekvatan.

Ĉu atente vi legis "Franca Esp.o"n? Se jes, vi povis konstati, ke nia tuta propagando estas sistemo nealudita. Tiu simpla fakto estas tre klariga, ĉu ne?

Mi povus partopreni la XII-an (5); sed, ĉar multaj kamaradoj el Germanio k. a. landoj ne povos ĉeesti, mi ne volas. Mi tute bedaùras, ĉar mi estus povonta renkonti vin.

Sindoneme via E. Adam

(P.S.:) Lastatempe idistoj insultis min dirinte: montru al ni la "Pravda"? (6) Ĉu estas neeble havigi al ni la n-on en kiu aperis la scitigon (tiel en la teksto). Jam tion mi demandis al vi.

Notoj

(1) FRANCA ESPERANTISTO.

(2) D-ro Pierre Corret, naskita en 1881, interesiĝis pri radio kaj pri sciencaj demandoj. Elektita ĉe la Akademio de Esperanto en 1920.

(3) Efektive, CLARTE (vidu antaùe) donis lokon al idistaj argumentoj.

(4) Hector Hodler

(5) La 12-a Universala Kongreso okazis en Hago en aùgusto 1920.

(6) La decido de la soveta registaro publikiĝis

en PRAVDA.

Esperantigo de la citaĵo el H. Barbusse:

"Estas fakte necese, ke de nun ni ne aperu kiel monsbaritaj tradiciemuloj, surdaj al ĉiaj sugestoj. Estus dezirinde, ke ni altiru al ni la idistojn helpe de sana prudento, t. e. agnoskante la pravecon de kelkaj Idaĵoj, kiuj sin vere trudas: tiel malaperos la fosaĵo, mi kredas..."

LETERO 7

Sama loterfronto, kiel por la letero n-ro 2

Sama adreso.

27-7-20

Estimata Sinjorino, (1)

Tre emociite mi eksciis pri la malsanego de via edzo, kaj el fundo de l' koro deziras ke li estu baldaŭ resaniĝita. (2)

Evidente mi skribis sensencaĵon, sed se vi bonvolos relegi la leteron vi konvinkiĝos, ke nur pro troa malkaŝemo mi aludis la samtempecon. Tute mi ne konas la daton de la porakademia elektado, ĉar oni ne komplezas sendi al "Esp. Lab." la oficialajn dokumentojn. Nu, sufiĉe pri tio, ĉu ne? (3)

Estas pli trafe por helpi la resanigon de via edzo sciigi lin, ke en Francio la propagando bone prosperas en niaj medioj. La idistoj furioze kaj lastatempe iu el ili insultis min pro kolero, dirante ke mi estas subaĉetita de la ..... "O.O." de generalo Sébert (4) k.t.p. Dio mia!!!...

Lastatempe ĉe la Sorbono la t. n. oficialaj propagandistoj neŭtraj devis konfesi, ke nun

estas en soc. medioj ke la poresperanta propagando estas plej favora. Oni konsekvence ekskiepodas por meti la manon ĉe la movado, por nin glori pri la rezultato atingita. Ne grave!.

Mi petas vin, estimata Sinjorino, ke vi bonvolu transdoni al via edzo mian plej sinceran dezirosprimon por lia baldaŭa kaj plena resaniĝo kaj akcepti ambaŭ mian samideanan saluton.

E. Adam

Notoj

(1) Tiu ĉi letero estas adresita al Angèle Privat-Fallot, la unua edzino de Edmond Privat. Oni ĝin ne konfuzu kun s-ino Yvonne Privat-Beuvier, kiun bone konas la esperantistoj.

(2) Edmond Privat grave malsaniĝis la 10-an de junio 1920. Lia edzino, tre impresiĝema, certe sendis maltrankvilajn leterojn al pluraj amikoj. La Fondaĵo Edmond Privat posedas tutan dosieron da leteroj esprimantaj bondezirojn kaj simpation okaze de tiu malsano. Jen, ekzemple, kion skribis Eduard Stettler, el Berno, la 20-an de junio 1920:

"Kara Sinjorino, Multan dankon pro viaj linioj, kiuj min terure ĉagrenas, mi ne povus diri kiel. Via amiko Privat estas tro bona, tro gaja kaj tro inteligenta por vin forlasi; ni bezonas lin. Lia malsano min obsedas la tutan tagon. Kion farus la esperanta movado sen li, kaj kion UEA? Post la morto de Hodler, li estis la sola svisa esperantisto al kiu mi povis komplete konfidenci..."

(3) Angèle Privat certe plendis pri la rimarko de Adam, en la 2-a paragrafo de la letero n-ro 6, kie li aludis, malprave, pri koincido inter prilingva sinteno de Privat kaj ties elekto ĉe la Akademio. Tiu rimarko de Adam estis karakteriza pri lia neflatema kaj iom agresa sincero.

(4) Generalo Hippolyte Sébert (naskita en 1839), artileria oficiro, membro de la Scienca Akademio de Francio. Kunfondinto de la Centra Oficejo. Laj prisociaj ideoj estis pleje malproksimaj de tiuj de Eùgeno Adam.

LETERO 8

Enkonduko

La letero de la 7-a de novembro estas la lasta, kiun ni retrovis. Estas dezirinde, ke oni malkovru ankoraù aliajn en unu el la pluraj dosieroj kie nun ne esploritaj. Tamen, necesas konfesi, ke Eùgeno Adam (aù Lanti, kiel li nomis sin ekde 1921) kaj Edmond Privat sekvis ja malsamajn vojojn. Adam fondis SAT en 1921; la unua kongreso okazis en Prago. Poste Lanti, kiu aniĝis al la Komunista Partio, iris al Sovetio por informiĝi pri la problemo de lá adopto de Esperanto far la Tria Internacio. La 2-a kongreso de SAT, okazinta en Frankfurto sur Majno, alprenis tre gravan decidon: per 90 voĉoj kontraù 29 kaj 78 sindetenoj, ĝi malpermesas al SAT-anoj aniĝon al burĝa aù neùtrala esperantista asocio. Tiu sektema decido kolerigis Romain Rolland, kiu malsolidariĝis disde Lanti en tre akra letero. Ĉar Edmond Privat estis tre ligita al Romain Rolland, li certe konsideris ne favore la ide-malvaston de SAT. Fakto ŝajnas pruvi al mi, ke la rilatoj Privat-Adam malstreĉiĝis: la apero de nekrologa artikolo pri Adam en ESPERANTO n-ro 262 (junio 1922):

"E. Adam, redaktintó de Sennacieca Revuo mortigis sin en oktobro 1921. Li skribis jenon en sia testamento: "Oni silentu pri mia morto. Se mi havas amikojn, ili ne funebru, sed male ĝoju. Oni ne malŝparu lokón en la gazeto por iu teda nekrologia artikolo. Se mi ne estus plene konscia

pri la sensignifo de mia vivo eble mi kuraĝus diri al la kunbatalintoj: se vi volas iel rememori pri mi, tio estu nur per senlaca propagando por sennacieca lingvo". Malgraŭ la deziro de la mortinto ni ne povas silenti lian malaperon kaj ni devas rememorigi, ke li estis sperta, larĝidea kaj progresema esperantisto kun realaj ideoj. Li energie estris la interesan "Sennacieĉan Revuon" nun redaktatan de E. Lanty."

Fakte Adam mortis nur por ke naskiĝu Lanti. Tiu ĉi pli kaj pli elreviĝis pri Sovetio, kaj li demisiis de la Komunista Partio en 1929.

Post emeritiĝo, li vojaĝis en la tuta mondo, en Japanio, en Aŭstralio, en Meksikio. Suferante pro nekuracebla malsano, li sin mortigis en Meksiko en 1947.

Edmond Privat daŭrigis en Svislando karieron de ĵurnalisto, de verkisto kaj profesoro, kaj mortis en Neuchâtel en 1962.

Teksto

Sama leterfronto, kiel por la letero n-ro 2.

Sama adreso.

7-11-20

Kara Samideano,

Vian laste eldonitan verkon (1) mi ankoraŭ ne ricevis kaj nur pri ĝi aŭdis varmajn laŭdojn.- Kompreneble mi estas tute preta fari servon afable petitan de vi. H. Barbusse ne loĝas en Paris, sed ĉiusemajne Noël Garnier (2) aŭ Brousse (3) veturas al Aumont par Senlis (Oise) por interkonsenti pri la propagando. Mi do povos transdoni vian libron al unu el la perantoj, aldonante verŝton klarigan pri la afero. Tio estos por mi trafa okazo plenumi, jam de kelka tempo elsentitan,

deziron: Plifervorigi la "Clartistes" kaj la "A.C." (4) rilate al iliaj poresperantaj deziroj. Al miaj jam faritaj admonoj ili ĉiam respondis: "Tempo mankas al ni k.t.p. por fosati la kursojn. Estas do necese, ke pri tiu punkto H. B. aŭdigu sian voĉon, kaj estuś sukcesa pli trafe se li mem fervorus (5). Tiucele la legado de via libro estos sendube efika instigilo. Vi povas esti certa, ke mi faros ĉion eblan por kontentigi vin kaj samtempe rapidigi nian treniĝantan aferon.

Mi dankas al vi pro via aludita atentigo pri nia gazeto. Nun ke estas eble aperigi artikolojn, notojn k.t.p. en ne esperantaj ĵurnaloj, mi opinias, ke pli trafe ni agos montrante per faktoj la valoron kaj la praktikecon de Esp.o. Por tio ni bezonus XVIpaĝan gazeton, kun artikoloj indaj je traduko nacilingven. Se ĉiuj esp. socialistoj en la mondo estus komprenintaj tiun vidpunkton mi opinias, ke ni povus havi tian organon.- La du eltranĉaĵoj apudaj montros al vi nian propagandmanieron.

Tutkore la via E. Adam

(P.S.:) En la lasta n-o de "Clarté" mi legas "Il n'existe encore aucune littérature universelle, parce que ns n'avons pas encore de langue commune;..." M. Gorki

Friparolinde!!! ĉu ne?

Pri tio mi atentigos H. B. rekomendante vian verkon.

Notoj

(1) Temas pri VIVO DE ZAMENHOF eldonita en 1920 de Brita Esperanto-Asocio.

(2) Verkisto subskribinta en 1917 la Manifeston de la batalantaj verkistoj, redaktitan de Henri Barbusse, membro de la iniciatanta komitato de CLARTÉ. Komunisto post la kongreso en Tours. Redakciano ĉe L'HUMANITE. Eliminita el tiu redakcio en 1922 far Jules Humbert-Droz nome de Komintern.

(3) Mi ne povis identigi tiun Brousse, kiu estis eble parenco de la fama Paul Brousse, anarkiisto, poste socialisto.

(4) Anciens Combattants.

(5) E. Adam ofte plendis, ke famuloj, kiaj Romain Rolland aŭ Henri Barbusse, aprobantaj la celon kaj la strukturojn de Esperanto, ne klopodis ĝin lerni.

Esperantigo de la citaĵo el M. Gorki:

"Ankoraŭ ekzistas neniu universala literaturo, ĉar ni ne ankoraŭ havas komunan lingvon."

Pierre Hirsch
La Chaux-de-Fonds, februaro 1973

Kunlaboris:
Claude Gacond kaj Henri Vatré

Biografiaj informoj

Pierre Hirsch naskiĝis en La Chaux-de-Fonds (Svislando) en 1913. Li studis en sia naskiĝurbo ĝis abiturientiĝo. Li licenciiĝis pri klasika beletro en la Universitato de Ĝenevo.

De 1936 ĝis 1939 li estis profesoro en Egiptio en registara duagrada lernejo. De 1939 ĝis 1971 li instruis en la Gimnazio de La Chaux-de-Fonds. Li fakiĝis pri Rousseau kaj Mallarmé.

Li ricevis libertempon de 1964 ĝis 1966 kaj subvencion de la svisa Nacia Fonduso por Scienca Esploro cele al la trastudo kaj valorigo de la arkivoj de Edmond Privat, kiuj troviĝas ekde la 10-a de junio 1964 en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Ekde 1972 li fariĝis komisiito pri esplorado por tiu biblioteko.

Fondaĵo Edmond Privat

Edmond Privat mortis la 28-an de aŭgusto 1962. Lia vidvino, Yvonne Privat-Bouvier, malavare donacis la manuskriptaron kaj dokumentaron de sia edzo al la urbo La Chaux-de-Fonds, por ke ili estu ordigitaj kaj valorigitaj en la kadro de la Urba Biblioteko. Konvencio estis subskribita de la urbo La Chaux-de-Fonds kaj de Yvonne Privat la 10-an de junio 1964.

En tiuj arkivoj troviĝas la verkoj, la gazetartikoloj, la radio-prelegoj, la libraro, la korespondado de Edmond Privat, same kiel multaj periodaĵoj, dosieroj kaj diversaĵoj.

Celoj de la kolekto STUDOJ

La kolekto STUDOJ per la eldono de fakaj verketoj sub formo de multobligitaj kajeroj celas la akceladon de la kulturaj kaj sciencaj interŝanĝoj helpe de Esperanto.

Eldonanto

Kultura Centro Esperantista
Miéville 133 Poŝtkonto: 23-2921
CH-2314 La Sagne (Svislando) Tel.: 039 31 51 62

Prezidanto: D-ro August Braun
Sekretario: Claude Gacond

Kajero numero 3

Aŭtoro: Pierre Hirsch
Rue de la Paix 1
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Tel.: 039 23 45 58

Titolo: Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat kun komentarioj de Pierre Hirsch

Fako: Korespondo

DK-numero 92 Lanti : 92 Privat

Resumo: Publikigo de 8 leteroj, kiujn Eugène Adam sendis en 1920 al Edmond Privat kaj kiuj nun troviĝas en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.

Eldono: Aprilo 1973